# HEROLDO DE UTENA

**Informilo de BET- 49, 09-07-2013, mardo** N-ro 4

## BET-49 OFICIALAS JAM –

## VIVU AMIKECO, VIVU ESPERANTO!

BET-49 ekvivis fakte jam sabate: okazis la unua komuna tagmanĝo en la kolegia manĝejo kaj poresperantista koncerto en la urba Muzika lernejo. Dimanĉe la esperantista renkontiĝo (kongreso?) BET ekfunkciis *de-jure* – okazis la solena inaŭguro!

En la koncerta salono de la Muzika lernejo kolektiĝis eble 200-persona esperantistaro veninta eĉ el 20 landoj. Agrablan etoson kreis aŭdigitaj Esperanto kantoj el la repertuaro de la "Oraj kantoj". La inaŭguran ceremonion ekgvidis prezidanto de Litova Esperantista Asocio Povilas Jegorovas, kiu emfazis gravecon de BET-oj ne nur por Baltiaj landoj. La esperantistan himnon "La Espero" kunkantis multaj el la kunvenintoj. Povilas Jegorovas proklamis la BET-49 inaŭgurita. La litova partopreninto de la 1-a BET, konata esperantisto Zenonas Sabalys (Šiauliai) tralegis la gratulan mesaĝon de Vydas Gedvilas, prezidanto de Litovia Sejmo (en la originala litova kaj en Esperanto).

Sekva ekparolis la urbestro de Utena Alvydas Katinas: "Saluton!" (en Esperanto!). Poste litove li prezentis sin kiel membro de Litova Verkista Asocio, poeto. Li akcentis, ke gravas ne tio kiom da lingvoj scipovas homo, sed gravas, ke unu homo komprenu la alian. Li mem estas feliĉa esti uzanto de la plej arkaika, litova lingvo. Li agnoskas ankaŭ la rolon de Esperanto, kiu estas ambasadoro de ĉiu nacia lingvo.

Estis tralegitaj ankoraŭ du gravaj mesaĝoj. La mesaĝon de Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA, tralegis Vilius Šidlauskas (Panevėžys). La mesaĝon de Osmo Buller, Ĝenerala direktoro de UEA, tralegis korea ĵurnalisto Taesok Choe (Vilno).

Biruta Rozenfelde (Rigo), la organizantino de la 1-a BET kelkvorte tuŝis la historion de BET-oj. Antaŭ 55 jaroj gejunuloj, studentoj el tri Baltiaj respublikoj renkontiĝis en Riga. Inter ili estis esperantistoj, kiuj decidis, ke bezonatas ne hazardaj, sed regulaj esperantistaj renkontiĝoj. Tiel aperis BET-oj. Biruta invitis ĉiujn veni sekvantjare al la jubilea BET-50 okazonta proksime de Rigo.

Post mallonga invitparolo de Margarita Želve, prezidantino de Latva Esperanto Asocio, kaj tiu kurta de Tonu Hirsik, prezidanto de Estona Esperanto Asocio (nur: "Vivu amikeco, vivu Esperanto!") finiĝis la oficiala parto de la kunveno. Povilas Jegorovas invitis ĉiujn fotiĝi ĉe la enirejo.



*Partoprenantoj de BET-49 (parton ŝirmas la arbotrunko) kun urbestro A. Katinas (apud P. Jegorovas)*

**Bildoj el la solena inaŭguro**


*Urbestro de Utena Alvydas Katinas*


*Gvidparolas Povilas Jegorovas*


*Parolas Biruta Rozenfelde*


*De dekst.: M.Lineckij, S.Marček, S.Smetanina, A.Junusov*

## IMPRESOJ PRI *ASORTI*

Sabatan vesperon en Muzika lernejo de Utena okazis koncerto de la familia muzika trio "Asorti". Kiun impreson faris ĉi tiu koncerto al la aŭskultantoj? Jen kelkaj impresaĵoj:

– Mi aŭdis unuafoje ilin kaj mi estis tiom imponita kaj surprizita. Tiom altnivela prezento! De la muzika flanko mi havas neniujn rimarkojn al ili. Iliaj kantoj multe gajnus se la prononcado de kantoteksto estus pli klara.

– Por mi ilia koncerto ege plaĉis. Ĝi estis en tre alta nivelo. Mi atendis de ili iun rokstilan prezenton, kaj surprize ekaŭdis la kantrian prezenton.

– La koncerto faris al mi ege fortan impreson. Ĉiuj el la trio estas lertaj muzikistoj, precipe la junulo. Imponis ilia senpera komunikado kun publiko (ekzemple, la patro simple sciigis, ke li forgesis kantovortojn).

La koncerto de "Asorti" ne estas la sola prezentado de Esperanto-kantoj. Nian renkontiĝon partoprenas homoj, kiuj povas ne nur prezenti sian Esperanto-repertuaron sed ankaŭ kantigi vin (se vi estas kantemulo). Ni parolas ne nur pri Miŝa Bronŝtejn kaj Mikaelo Povorin kaj Natalia Bertse.

**EKSTRA OFERTO DE ESPERANTO-KANTOJ !!!**
**Marde – Nataŝa Bertse,**
**ĵaŭde –Mikaelo Povorin**
**En la aŭditorio 2-16, je la 18-a horo.**
**Venu, aŭskultu kaj kunkantu, do!**

## HEROLDO VIA KAJ POR VI

*Heroldo de Utena* estas gazeto de BET-49. Por kiu, kara leganto? Ĉu por vi, kara partoprenato de BET? Tamen kies opinion kaj vidon ĝi prezentas? Ĝis nun nur de la redaktoro mem. De nun ankaŭ vian, aŭ se vi deziros – nur vian. Nur tiam se vi kaptos la okazon – ja *Heroldo* pretendas esti via tribuno. Eluzu ĝin por laŭte prezenti vian opinion, por starigi viajn problemojn, pervorte aŭ fote fiksi viajn impresojn, konstati faktojn. Kiel vi akceptas tion, kion vi vidas partopreninte aŭ ĉeestinte la programon? Kio al vi plaĉas aŭ ne tre? Vi ekhavis iujn ideojn aŭ proponojn? Ne malkaŝu tion, publikigu!
Jam antaŭ longe pasis la soveta tempo kiam oni devis kaŝi sian opinion kaj humile laŭtdiri opinion de komunista partio. Estu do *Heroldo* via libera tribuno!

Redaktoro

## ĈIAM PLI BONE IOM FRUE OL

La vesperon de la 6-a de julio (Litova ŝtatfesto pri kronado de litova reĝo Mindaugas) sian naskiĝtagon komencis festi konata bardo kaj verkisto Mikaelo Bronŝtejn. Mikaelo naskiĝis la 7-an de julio 1949. Estas li homo modesta kaj volonte akceptos viajn bondezirojn dum la tuta BET-semajno. Fartu li bone kaj kontente! Vidu kelkajn fotojn el la komenco de la festado.










*Utena. BET-49. Studenta  hejmo. Kungitaras Natalia Bertse kaj Mihail Povorin*

## PROMENU ĈIRKAŬ LA URBA LAGO





Mi nun partoprenas la Esperanto-aranĝon en Utena. Hodiaŭ matene antaŭ matenmanĝo mi promenis ĉirkaŭ la lago Dauniškis. Mi rimarkis, ke en litova somero frumatene suno brilas, kaj poste nuboj dise aperas. Mi ĝuis trankvilan matenon kun birda pepado. Iuj anasoj ankoraŭ kaŭrante dormis ĉe lagorando, kaj iuj korvoj duŝis sin per laga akvo. Iuj kaptis fiŝojn, aliaj naĝis en la lago. La laga promenejo estas tre bone ordigita. Mi rekomendas ĉi tiun promenon al tiuj, kiuj ŝatas matenan sunbrilon kaj freŝaeran lagon. La promeno daŭris ĉirkaŭ horon.

(CHOE Taesok)

## TRA NORDORIENTA LITOVIO

La **ekskurso okazos merkrede** (la 10-an de julio).
**La forveturo** – je la 8-a horo de studenta manĝejo (Maironio str. 18). Por ekskursontoj tie je la 7-a horo okazos la matenmanĝo.

La prezo de de la ekskurso – 90 Lidoj inkluzivas kostojn de:

1. Enirbiletoj al la distrikta muzeo de Rokiškis kun loka ĉiĉerono.
2. Flosado al la insulo kun fiŝsupo.
3. Ekskurso al akva muelejo kun gustumado de Aŭkŝtajtaj flanoj.

**La reveno** – je la 22-a horo

Al la bierfarejo de Utena okazos du ekskursoj (forveturoj de la Kolegio – Utenio a. 2):

1. La 9-an de julio (marde) je la 14-a horo. La daŭro 2,5 horoj. Kungustumado de 5 specoj de bieroj (kun almanĝetaĵoj).
2. La 11-an de julio je la 14-a horo. La daŭro 2 horoj. Sen biera gustumado.

*Antanas Visockas*

La **peto al ekskursontoj**: Dum la veturado surpaperigu iom da viaj freŝaj impresoj kaj eĉ nur mallongan vojaĝraporton prezentu por publikigo en la *Heroldo*. Ju pli frue, des pli bone! Ni volonte kopius al la redakcia komputilo kelkajn vojaĝajn fotojn. Antaŭdankon!

*Redaktoro*

## ŜERCE AŬ IRONIE

**Starpunkto** (laŭ Juozas Erlickas)

La kandidato dum la balota kampanjo demandis al Konstitucia klarigisto:

– Rabbi (mia majstro), kion mi faru, por ke mi gajnu kaj estu elektita?
Tiu diris:
– Mensogu al elektantoj plenkore, plenanime, tutforte kaj tutmense. Kaj plej gravas – ekkredu vi mem pri tio, kion vi mesogas.
La kandidato respondis:
– Ĝuste tiel mi faros!

## Vetera prognozo

Por la 10-a de julio (merkredo)

Iom ombraj sed senpluvaj mateno, tago, vespero. Temperaturo tage +21-23◦C

Por la 11-a de julio (ĵaŭdo)
Ombraj mateno, tago, vespero, senpluvaj.
Temperaturo tage +21-25◦C

## KOSMAJ SIMBOLOJ DE ORIENTO

En la vestiblo de nia kunvenejo funkcias atentinda ekspozicio. La ekspozicio estas prilaborita de Esperanto-Rondo ĉe la Muzeo pri Azio kaj Pacifiko en Varsovio okaze de Internacia Jaro de Astronomio.



La ekspozicio prezentas kelke da temoj: barata mitologio, ĉina taoismo, tantro-jogo, hebrea kabalo, ĝinismo, egipta mitologio. La barata kulturo estas eksterordinare riĉa rilate al simboloj. La sankta silabo OM kiel simbolo de pleneco indikas kreon de la kosmo, ĝian daŭron kaj krean detruon. Tiu ĉi kosma ciklo estas ankaŭ esprimata de trimurto, t.e. triunuo de la plej altaj dioj: Brahmo, Visĉnuo kaj Ŝivao. Ŝri Jantro povas esti instrumento de la mond-detruado aŭ vojo de la reveno al spiritaj fortoj. Ekstaru ĉe la eksponitaĵoj kaj iom meditu ...

*Krzysztof Sliwinski*



**ATENTON**
**AL ESPERANTO KURSANOJ!**

**La lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj okazos nur dum la horoj 9.00–11.00**

Verku kaj fotu por *HdeU* !
Redaktoro
Vytautas Šilas,
+370 611 75500
vilnastelo@yahoo.lt